

# 13

## ,Ave Maria‘

### En La Sovagejo

**K**iam ni estis ekrajdinta je la sekvinta mateno, mia nigra virĉevalo pruvigis esti ekscelenta ĉevalo. Rajdanto, kiu sciis nenion pri indiana edukado, certe estus restinta neniun minuton en la selo, sed ni baldaŭ estis kutimiĝinta unu al la alia. Ankaŭ la maljuna Viktor elteniĝis tre bone, kaj tiel ni rapide antaŭeniĝis. Jam je la tagmezo ni atingis la lastan restejon de la *railtroubler*:oj, do ni estis proksimiĝintaj al ili je duona tagrajdado.

La spuro, kiun ni sekvis, estis forlasinta la regionon de la antaŭe menciita rivereto, kaj ree kondukis norden en longan montaran valon, tra kiu kurbiĝis la Pacific Creek. Mi rimarkis, ke Winnetou rigardis la teron nun pli atente ol antaŭe. Same liaj okuloj provis vidi en la arbaron, kiu staris sur ambaŭ valmuroj malsupren ĝis la bazo. Fine li eĉ haltis kaj turniĝis, ĉar ni rajdis unu post la alia, kaj li estis la plej antaŭa, reen al mi.

„Uŝ!“ li vokis. Kion diras mia frato Ŝarlih pri tiu vojo?“

„Ĝi certe kondukas al la altaĵa kresto.“

„Kaj poste, ĉu?“

„Sur la alia flanko certe troviĝas le celo de la *railtroubler*:oj.“

„Kiu celo tiu estos?“

„La restejo de la ogelaloj.“

Winnetou kapjesis.

Mia frato Ŝarlih kiel ĉiam havas la okulon de la aglo kaj la flarkapablon de la vulpo. Li pensis prave.“

Tiam li gardiĝe plurajdis.

„Kial la restejo de la ogelaloj?“ Akrokulo enmiksiĝis.

„Mi jam demandis Vin fojon antaŭe, ĉu Vi kredas, ke tri indianoj aliĝus al aro de blankuloj sen gravaj kaŭzoj“, mi respondis. „Ja tute klaras, ke bando de pli ol dudek fibuboj ne povas fari iliajn fiagojn en tiu ĉi regiono sen esti rimarkataj de la ruĝuloj.“

„Ne, certe ne.“

„Do al kio la blankuloj konklude estas devigataj?“

„Hm, jes! Ili certe devis iĝi sub la sekurecon de la ruĝuloj.“

„Ĉu ili havos tiun sekurecon senkoste?“

„Ne, ili certe devas pagi ĝin.“

„Per kio?“

„Per tio, kion ili havas, per akiraĵoj.“

„Bele. Ĉu Vi nun komprenas, kion ni du supozas, Winnetou kaj mi?“

„Ha, do estas tio! La blankuloj atakis la trajnon, kaj la tri ogelaloj estis la rigardistoj, ĉar la blankuloj certe devos eldoni certan akiran parton al la ruĝuloj.“

„Eble estas tiel, eble ne. Sed certas, ke niaj estimindaj blankaj fratoj baldaŭ renkontos pli grandan trupon da ruĝhaŭtuloj. Tion mi jam diris tie malsupre ĉe la fervojo. Sed plu! Ĉu Vi nu kredas, ke ruĝuloj kaj blankuloj nur kuniĝis pro kune maldiligente restadi sur ursfelo? Ili baldaŭ planos novan diablajn, ankaŭ ĉar la lasta ja tiel bone sukcesis.“

„Kia povus esti tio?“

„Hm, mi havas specon de antaŭsento.“

„Tio estus tro multe! Antaŭsenti, kion faros aliaj homoj, kiujn Vi eĉ ne vidis! Charley, mi havas altan respekton antaŭ Old Shatterhand, sed tiu antaŭsento ja ne estos tro grava afero.“

„Ni atendu la finon! Mi sufiĉe estis rigardante dum mi estis inter la *indsman*:oj pro koni ilian agmanieron. Kaj ĉu Vi scias, kiel oni povas plej bone diveni, kion homo faros?“

„Ĉu?“

„Kiam oni sufiĉe imageme metiĝas en la situacion, en kiu li estas, kaj kunkalkulas lian karakteron. Ĉu mi foje estu tiel aŭdace diveni?“

„Vi scivoligas min!“

„Bone! Al kiu la fervojistaro nu unue anoncis la detruon de la relvojoj kaj la neigon de la trajno?“

„Tutcerte al la neksta stacio.“

„Do de tie oni sendos virojn al la akcidentejoj, pro ekzameni ĝin kaj persekuti la kulpantojn. Sed per tio tiu stacio estos malplenigita je homoj, kaj tiel ĝi povas esti atakata sen alta danĝero.“

„Egad! Nun mi antaŭsentas, kion Vi pensas!“

„Ĉu ne? La cirkonstancoj tie ĉi ankoraŭ havas improvizan karakteron. Demandindas, je kiu punkto oni havos sufiĉe da viroj pro elsendi tian trupon. Laŭ mia opinio tiu certe estos la stacio Echo. Ĝi ricevis sian nomon per la *Echo-cañon*, en kiu ĝi situas.“

„Charley, Vi povus pravi. La *railtroubler*:oj kaj la ruĝuloj certe scias same kiel ni, ke tiam la loko estos sen gardo.“

„Ni plue enkalkulu, ke la suoj elterigis iliajn militajn hakilojn kaj surmetis ilian militkoloran ŝminkon, ke ili do sen ĉia dubo havas malamikecajn intencojn, do supozendas,

ke ili fakte celas al Echo. — Sed vidu, tie estas la fonto de la rivereto! Nun la vojo tre krutas, kaj ni ne havas tempon plu babili!“

Sub altaj arboj ni rajdis laŭ la South Pass. La tereno estis malfacile rajdebla, kaj ni devis atentigi. Malsupre la altaĵo vastiĝis tabulece, kaj tiam remalsupreniĝis valen, kie ni baldaŭ atingis la riveron Sweet Water, kiu estis bonkonata al mi de antaŭaj fojoj.

Ĉi tie la sekvatoj estis restintaj je la tagmezo, kaj poste turniĝintaj norden laŭ la Willow Creek. Ni pasis plurajn malgrandajn valojn, iris tra kelkaj valetoj, tra kelkaj kanjonoj, kaj la spuroj ĉiam pli kaj pli freŝiĝis, tial ke ni ĉiam pli atentigis.

Finfine ni atingis je la vespero la altaĵon de vasta montokresto, kaj ni jam volis deflankiĝi malsupren laŭ la alia flanko, kiam la antaŭrajdanta apaĉo haltigis sian ĉevalon kaj montris antaŭen per la etendita mano.

„Uŝ!“ li vokis per mallaŭtigita voĉo.

Ni haltis kaj vidis en la indikitan direkton.

Dekstre de ni vastiĝis profunde malsupre malgranda ebenaĵo, kies vasteco estis ĉirkaŭ tiu de hora rajdado. Ĝi estis malkovrita kaj surkreskita per herboj. Tie ni ekvidis nombron da indianaj tendoj, ĉe kiuj estis viglaj moviĝoj. Senrajdantaj ĉevaloj paŝtiĝis sur la abundaj verdaĵoj, kaj multenombraj viroj ĉie ĉirkaŭe okupiĝis. Oni estis ĉasinta viandon. Ekster la tendoj estis la ostaroj de kelkaj bubaloj, kaj trans la palisoj oni estis streĉiginta ŝnurojn, de kiuj oni estis pendigintaj maldikajn pecojn de la bubalviando pro sekigado.

„Ogelaloj!“ Stephen diris.

„Ĉu Vi vidas, ke mi pravis?“

„Tridek du tendoj!“ li aligis.

Winnetou klopode rigardis malsupren.

„*Naki gutesnontin nagoija* — du cent militistoj!“

„Kaj la blankuloj estas ĉe ili“ mi komentis. „Ni nombru la ĉevalojn, tiel ni pleje certigis.“

Estis neeble al ni vidi al la tuta ebenaĵo, kaj ni nombris ducent kvin ĉevalojn. Pro ĉasirado oni estis ĉasinta tro malpli da viando, ankaŭ tiu valo ne estis ejo pro mult-haviga bubalĉasado. Do estis militirado, kion ankaŭ pruvis la ŝirmiloj, kiujn la ruĝuloj kunhavis. Dum la ĉasado ŝirmilo ja estis pli malhelpo ol utile. La plej granda tendo estis iomete aparte de la aliaj, kaj la agloplumoj, kiuj ornamis antaŭe enterpremitan lancon diveneblis, ke estis la tendo de la ĉefo.

„Kion mia frato Ŝarlih pensas? Ĉu tiuj ogelalaj bufoj restos ankoraŭ longe tie ĉi?“

„Ne.“

„Per kio Vi konkludas tion, Charley?“ Stephen demandis. „Tia demando estas malfacile respondebla.“

„Vidu al la ostaroj de la finuzitaj bubaloj, Stephen! La ostoj jam blankas. Ili estas paligintaj kaj certe kuŝis kvar aŭ kvin tagoj en la sunlumo. La viando do certe estas sufiĉe seka. Ĉu Vi pensas, ke ne?“

„Ĉiukaze!“

„Nu, do la ruĝuloj povas ekrajdi. Aŭ ĉu Vi eble pensas, ke ili restos tie ĉi pro ankoraŭ finigi kelkajn ludojn de ŝako aŭ damoj?“

„Vi fikazuas, Charley. Mi nur volis aŭdi, kion Vi dirus“, Akrokulo defendiĝis, sed tiam tuj poste montris ekscitigite malsupren en la valon. „Ha, tie iu venas el la ĉeftendo! Vidu!“

La apaĉo metis la manon en la selpoŝon kaj eltiris teleskopon. Li disŝovis la membrojn de la tubo kaj metis ĝin al la okulo, pro pli detale vidi al la viro, pri kiu Stephen parolis. Kiam li redemetis ĝin kaj donis ĝin al mi, ekmoviĝis liaj trajtoj kolere kiel fulmo.

„Ko-itse, la mensogisto kaj perfidisto!“

Mi vidis tra la tubo kaj same vidis al la ruĝulo. Ko-itse signifas Fajrobuŝo. La posedanto de tiu nomo estis ĉefo de la ogelaloj, fama kiel bona parolisto, riskema militisto kaj malpardonema malamiko de la blankuloj. Se ni volas okupiĝi pri li, ni devis atentiĝi.

Tiam mi pludonis la tubon al Akrokulo, kaj komentis dum tio:

„Estos bone, ke ni kaŝiĝas. Tie supre estas videblaj multe pli ĉevaloj ol viroj, kaj se ankaŭ multaj kuŝas en la tendoj, tamen supozendas, ke kelkaj el la trupo ĉirkaŭsploras.“

„Miaj fratoj atendu“, la apaĉo diris. „Winnetou serĉos lokon, kie li povos kaŝiĝi kun la amikoj.“

Rapide li malaperis malantaŭ la arbedoj kaj revenis nur post pli longa tempo. Tiam li gvidis nin flanken laŭ la kresto al loko, kie la subkreskaĵoj estis tiel dense, ke ni preskaŭ ne povis trairi ĝin. En la interno de la densaĵo estis sufiĉe da spaco por ni kaj niaj ĉevaloj, kiujn ni alligis anstataŭ kateni iliajn krurojn, dum la apaĉo foriris fojon plu pro nerimarkebligi niajn spurojn.

Tie ĉi ni restis ĝis la komenco de la malheliĝo en la altaj, odorantaj arbaraj herboj, prete ĉiun momenton salte stariĝi je la plej eta suspekta brueto kaj kovri la nazojn de la ĉevaloj, proke ilia spirego ne povis malkaŝigi nin. Kiam estis tute malhele, Winnetou denove forkaŝiris, kaj baldaŭ revenis kun la mesaĝo, ke oni tie malsupre estis bruliginta kelkajn fajrojn.

„Tiuj homoj sentas sin esti tre sekure“, Akrokulo diris. „Se ili sciis, ke ni estas tiel proksime al ili!“

„Ke ili estas sekvataj, tion ili ja certe sentas“, mi respondis. „Do se ili sentas sin sekure ankoraŭ hodiaŭ, tio povas nur havi la kaŭzon, ke ili estas konvinkitaj, ke la stacionanoj ne povas esti tie ĉi jam hodiaŭ. Per tio mi volas konkludi, ke ili ekrajdos morgaŭ. Ni provu ekscii ion.“

„Winnetou iros“ la apaĉo deklaris.

„Mi kuniros“, mi diris. „Akrokulo restu ĉe la ĉevaloj. La pafilojn ni lasos tie ĉi. Ili estus nur malhelpantaj al ni. Tranĉiloj kaj pugnoj sufiĉos, kaj en la kazo de plej urĝa danĝero ni ankoraŭ havos niajn revolverojn.“

Nia akompananto tuj konsentis resti tie. Li ĉiukaze havis sufiĉan kuraĝon kaj sperton kaŝiri al la ruĝuloj. Kio restigis lin malantaŭe, mi antaŭsentis. Li agnoskis la superan majstrecon de Winnetou, kaj al Winnetou do apartenis Old Shatterhand.

Estis tri aŭ kvar tagoj antaŭ novluno. La ĉielo havis nubojn, kaj neniuj steloj videblis. La nokto do estis eminente taŭga al nia intenco. Senbruite ni kaŝrampis el la densejo ĝis al la loko, kie ni estis haltintaj je la posttagmezo.

„Winnetou iros dekstren, kaj mia frato Ŝarlih iru maldekstren!“ la apaĉo flustris, kaj en la neksta momento li estis malaperinta en la malheleco de la arbaro.

Obeante la ordonon de la amiko mi kaŝiris malsupren laŭ la maldekstra flanko de la kruta deklivo. Mi atingis, neaŭdeble kurbiĝinte inter la arbedoj kaj arboj malsupren, la bazon de la valo, kaj nun ekvidis la resteajn fajrojn antaŭ mi. Nun mi igis la *bowie*-tranĉilon inter la dentojn, kuŝiĝis sur la herbejon kaj malrapide ŝoviĝis antaŭen al la ĉefa tendo, kiu estis ĉirkaŭ ducent paŝojn for de mi. Antaŭ ĝi brulis fajro, sed la tendo faris ombrojn sur min.

Nur colon post colo mi antaŭeniĝis, sed la venteto blovis kontraŭ mi, kaj tiel mi ne devis timi pri la ĉevaloj, kiuj kutime anoncas la alproksimiĝon de fremdulo per spirego. Tiurilate Winnetou devis sukcesi multe pli malfacilan taskon ol mi.

Tiel estis pasiĝinta pli ol duona horo, antaŭ ke mi estis rampinta la ducent paŝojn. Nun mi kuŝis rekte malantaŭ la bubalfela tendo de la ĉefo, kaj la viroj, kiuj sidis ĉe la fajro, estis maksimume kvin metrojn for de mi. Ili interparolis vigle en la angla lingvo, kaj kiam mi riskis iomete etendi la kapon antaŭen pro povi vidi ilin, mi rimarkis, ke estis kvin blankuloj kaj tri indianoj.

La ruĝuloj diris preskaŭ neniun vorton. Nur la blankulo laŭtiĝas ĉe la resteja fajro, dum la koncizema kaj gardiĝa indiano parolas plie per ĝeneralaj signoj ol per vortoj. Ankaŭ la fajro brulis hele, ne en la indiana maniero.

Unu el la blankuloj estis alta, barbhava viro, kiu havis la cikatron de tranĉila lezo sur la frunto. Li ŝajnis esti la grava parolanto, kaj la maniero, en kiu la aliaj kondukis al li, supozendis, ke li estis estranta karaktero. Mi povis aŭdi bone, kion la homoj interparolis.

„Kaj kiel longe estas de tie ĉi ĝis Echo?“ iu demandis.

„Preskaŭ ducent mejlojn“, la altulo respondis. „Atingeblas post kvin ĝis ses tagrajdadoj.“

„Sed kio, se nia kalkulado malĝustas, se oni ne sekvis nin kaj la homoj tie estas plennombre?“

La altulo ridis neigante.

„Sensencaĵo! Oni sekvas nin, tio certas. Ni ja faris la spuron por ili sufiĉe klare. Pereis ĉirkaŭ tridek homoj dum la atako, kaj ni haviĝis bonan akiron. Tion oni ne akceptos, sen almenaŭ provi atingi nin.“

„Se tio ĝustas, la plano sukcesu!“ ĝojiĝis la alia. „Kiom da homoj estas dungataj en Echo, Daniels?“

„Ĉirkaŭ cent kvindek“, la alparolita respondis, „ĉiuj bone armitaj. Krome tieas kelkaj bone plenigitaj *store*:oj, pluraj drinkejoj, kaj ke ni trovos plenan konstruadan kaj administradan kason, pri tio ni ne devas afliktiĝi. Mi aŭdis, ke tiu kaso devas pagi ĉiujn elspezojn, kiuj estas farataj inter Green River kaj Promontory. Tio estas distanco de ĉirkaŭ ducent tridek mejloj. Do oni rajtas supozi, ke tie estas multaj miloj.“

„*Heigh-day*, tio sonas bone! Kaj vi kredas, ke ni flankenigos la sekvantojn de nia spuro, ĉu?“

„Ĉiukaze. Mi taksas, ke ili estos tie ĉi morgaŭ je la posttagmezo. Ni ekrajdos dum la matena krepusko, unue iros kelkan vojon norden kaj tiam partiĝos al diversaj direktoj

en tiom trupojn, ke ili ne scios, kiun spuron ili devos sekvi. Pli poste ĉiu trupo forviŝos sian spuron, kaj ni rekunvenos tie malsupre ĉe la Green River. De tie ni evitos ĉiun malkovratejon kaj povos esti post kvin ĝis ses tagoj ekde hodiaŭ en Echo.“

„Ĉu ni antaŭsendos esploristojn?“

„Memkompreneble! Morgaŭ frue ili iros rekte al Echo, kaj atendos nin norde de la stacio. Tio ĉio jam estas interkonsentigita. Eĉ se la laboristoj plennombre estos en Echo, ni ne devos zorgiĝi. Ni pli fortas ol ili, kaj antaŭ ili povos ekpreni la armilojn, la plej granda parto el ili estos neigita.“

Verece mi ne povis esti aperinta je pli bona momento kiel kaŝaŭskultanto, ĉar kion mi ekkonis tie ĉi estis multe pli ol mi estis povinta ekspekti. Ĉu mi restu pli longe? Ne. Pli multe neniukaze estis ekscieble, kontraŭe la plej eta cirkonstanco ja povis perfidi mian ĉeeston. Do mi malrapide reencedis.

Tio ankoraŭ okazigis en profunden kliniĝinta pozicio, fakte malantaŭen, ĉar mi ja devis atente forviŝi mian spuron, proke ĝi ne estis rimarkota je la sekvinta mateno. Tio, ĉar mi ja povis agi nur laŭ la sento kaj devis tuŝi preskaŭ ĉiun solan herbotigon, estis tre temporaba laborado, kaj certe daŭris horon, ĝis mi reatingis la randon de la arbaron kaj estis en sekureco.

Nun mi metis la kurbigitajn manojn al la buŝo kaj sonigis la vokon de la granda verda bombinatoro. Tio ekde ĉiam estis de Winnetou kaj mi interkonsentigita signo pro retiriĝo, kaj mi estis konvinkita, ke li aŭdus ĝin kaj agus laŭ ĝi. Al la indianoj tiu bleko ne povis suspektiĝi, ĉar la ĉeesto de tia besto tie ĉi en la alta, malseka herbejo facile supozindis, kaj ĉar ankaŭ ja estis vespero, kiam tiuj kutime laŭtiĝas.

Mi pensis ĝin esti necese doni tiun signon. La apaĉo kuŝis laŭ la vento kaj povis esti facile ekrimarkata. Kion mi estis eksciinta plene sufiĉis, kaj tial estis konsilinde sciigi lin, ke nia intenco estis plenumigita.

Mi ankaŭ devis forviŝi la spuron supren laŭ la altaĵo, kaj tial mi ĝojis, kiam mi finfine malgraŭ la malheleco feliĉe atingis nian densaĵejon.

„Nu, kiel ĝi estis?“ Akrokulo demandis.

„Atendu, ĝis Winnetou venos!“

„Ĉu atendi? Mi ardas per scivolo.“

„Do pro mi finbrulu! Oni ne ŝatas elparoli nenecesajojn, kaj mi ne volas doni mian raporton du fojojn.“

Pri tio li devis kontentiĝi, kvankam daŭris longe, ĝis Winnetou venis.

Finfine ni aŭdis la arbedaĵojn susureti. Li mallaŭte rapidis al ni kaj kuŝiĝis je mia flanko.

„Mia frato Ŝarlih donis la signon al mi, ĉu?“ li demandis.

„Jes.“

„Do mia frato havis sukceson?“

„Jes. Kaj kion eksciis la ĉefo de la apaĉoj?“

„Li eksciis nenion. Li bezonis longan tempon pro preterpasi la ĉevalojn, kaj kiam li estis preskaŭ atinginta unu el la fajrojn, li aŭdis la blekon de la bufo. Tiam li devis neigi sian spuron, kaj la steloj leviĝis alten, antaŭ li povis veni. Kion mia frato eksciis?“

„Ni aŭdis ĉion, kion ni devas scii.“

„Mia frato ĉiam sukcesas, kiam li kaŝaŭskultas la malamikon. Li rakontu!“

Koncize mi raportis, kion mi estis aŭdinta. Kiam mi estis finiĝinta, Akrokulo diris:

„Do Via supozo estis ĝusta, Charley. Tio pri la atako estis bone divenita.“

„Ne malfacilis.“

„Kaj kiel aspektis la altulo? Li havis cikatron sur la frunto, ĉu?“

„Jes.“

„Kaj grandan barbon, ĉu?“

„Jes.“

„Estas li, kiun mi delonge serĉas. Estas li, kvankam li tiutempe ne jam havis barbon. La cikatron li ricevis dum atako al bieno tie malsupre ĉe Leavingworth. Kaj kiel li estis nomata?“

„Daniels.“

„Tion oni enmemorigu. Jam estas la kvara malĝusta nomo, kiun mi aŭdis je li. Sed kion ni faros, Charley? Ni ja ne povas eltiri lin hodiaŭ.“

„Tio fakte neblas. Kaj cetere Via punado de li sole ja ne povos sufiĉi al Vi. La aliaj *railtroubler*:oj ne estas malpli malicaj ol li. Mi volas diri al Vi, Stephen, ke mi dum miaj migradoj ĉiam laŭeble evitis mortigi homon, ĉar homa sango estas la plej valora likvaĵo kiu estas. Pli ŝate mi estis suferinta damaĝon ol ekpreni la mortigan armilon, kaj se tamen devis okazi, ĉiam okazis nur dum plej urĝa defendiĝo. Kaj eĉ tiam mi pli ŝate nur sendanĝerigis la malamikon, ol neigi lian vivon.“

„Jes“, Akrokulo diris. „Tiel Old Shatterhand estis priskribita al mi.“

Mi pluis:

„Tamen mi neniam ekhavos la ideon trankvile lasi forkuri maliculon aŭ eĉ tutan aron da tiuj fiuloj. Tio ja signifus estiĝi ilia kunkulpanto kaj lasi ilin ataki decajn homojn denove. Ni ne povas eltiri tiun Monk:on aŭ Daniels:on. Certe, estus estinta facilaĵo al mi sendanĝerigi lin. Sed rilate al tio, kion li fifaris, tia rapida ekmorto estus estinta ja rekompenco. Kaj antaŭ ĉio mi opinias, ke ni ankaŭ devas kapti liajn helpantojn, kaj tiam nur povas okazi, kiam ni senĝenate lasos ilin iri al Echo.“

„Kaj ni, ĉu?“

„Ne demandendas. Ni iĝos antaŭ ilin kaj avertas la homojn, kiuj devas esti atakotaj.“

„*Well!* Tiu penso povas plaĉi al mi. Eble ni sukcesos kapti la rabmurdiston vivante. Sed ĉu ili ne estos superaj al ni je nombro?“

„Ni sekvis ilin triope sen timiĝi, kaj timos antaŭ ili des malpli, kiam ni estos trovintaj alianculojn en Echo.“

„Bedaŭrinde ni sed ne trovos multajn. La plej granda parto de ili estos persekutantaj.“

„Do estu nia zorgo sciigi ilin pri la cirkonstancoj, tiel ke ili returniĝas laŭeble rapide. Mi skribos mesaĝon kaj fiksigas la paperon sur arbon tie, kie preteriras la spuro, kiun ili sekvas.“

„Hm! Ĉu ili kredos al tiu mesaĝo? Ja povus nur esti ruziĝo de la *railtroubler*:oj pro rezigni la vengantojn pri persekutado.“

„Tio ĝustas. Sed ili estos aŭdintaj de niaj kunvojaĝintoj, ke du eltrajniĝis je la akcidentejo, kaj certe ankaŭ trovis niajn spurojn. Cetere mi konceptos la mesaĝon tiel, ke ĝi estos kredinde. Krome mi petos al la viroj eviti la supran Green River:on kaj la regionon norde de Echo, ĉar je la unua loko la suoj volas renkontiĝi kaj je la dua estos la esploristoj. Tiuj neniukaze devas rimarki la revenontajn fervojistojn, kaj tial mi ankaŭ emfazigos, ke la reveno al Echo okazigu de la sudo.“

„Uf!“ nun Winnetou diris. „Miaj blankaj fratoj ekrajdu kun mi. La suno vidu nin jam for de tie ĉi, kiam ĝi leviĝos.“

„Sed kio, se oni rimarkos niajn spurojn morgaŭ matene?“ Stephen ankoraŭ pripensante demandis.

„La hundoj de la ogelaloj tuj rajdos norden, kaj neniu el ili venos sur ĉi tiun altaĵon. *Hongh!*“

Post tio Winnetou stariĝis kaj paŝis al sia Iltŝi pro malligi ĝin. Ni kondukis la ĉevalojn el la densaĵo, suriĝis kaj rajdis reen laŭ la sama vojo, laŭ kiu ni estis venintaj. Dumnokta ripozo bedaŭrinde ne estis eble.

Ankoraŭ estis same malhele kiel antaŭe, kaj nur okcidentulo povis riski iri en tiel malfacila tereno tra la praarbaro kaj rajdi laŭ spuron, kiun li ne povis vidi. Eŭropa rajdanto estus deĉevaliĝinta en tiu malheleco pro konduki sian ĉevalon, sed la okcidentulo scias, ke sia besto havas pli bonajn okulojn ol li. Jen Winnetou prezentigis per ĉiu sia eminenteco. Li rajdis antaŭe, trans riveretoj kaj rokoj, trans kreskaĵo kaj ŝtonaĵo, kaj ne unu momenton li estis dubanta, al kiu direkto li turniĝu. Mia nigra virĉevalo pruviĝis bonege, kaj la malnova Viktor ja intertempe spiregis malŝate, sed teniĝis same rapide kiel ni.

Kiam komencis krepuski ni estis certe naŭ ĝis dek mejlojn for de la restejo de la ogelaloj, kaj nun povis kurigi niajn ĉevalojn pli rapide. Nia rajdado unue reeniris suden. Kiam mi trovis taŭgan lokon, ni haltis. Mi ŝiris paĝon el mia notlibro, skribis la necesajn sciigojn per la krajono sur ĝin, kaj tiam pikis ĝin per pintigita lignaĵo tiel en la ŝelon de arbo, ke ajn iu, kiu venis de la sudo, tutcerte devis rimarki ĝin. Tiam ni flankeniĝis plie dekstren, al la direkto de la sudokcidento.

Je la tagmezo de la sekvinta tago ni iris tra la Green River, sed ja tre longadistance for de la loko, kie la unuopaj trupoj de la ogelaloj volis renkontiĝi. La ruĝuloj devis eviti ĉiun malkovraton ejon kaj teniĝi sur kromvojoj en la praarbaroj. Sed ni povis iri al la laŭeble rekta direkto, kaj ne lasis reston al nia ĉevaloj, ĝis la suno malleviĝis.

Je la vespero de la tria tago ni tucerte estis pasigintaj pli ol cent kvindek mejlojn, kaj estis miriga, ke la malnova Viktor ankoraŭ teniĝis. Ni rajdis inter du dense aliĝintaj altaĵoj kaj ĵus estis serĉanta lokon, kiu taŭgis kiel restejo. Tiam la altaĵoj subite disiĝis, kaj ni troviĝis je la flanko eniro de pli granda valo, en kies mezo estis malgranda lago. Ĝi estis plenigata de rivereto, kiu fluis de la okcidento, kaj plufuis, post ĝi estis forlasinta la lagon, orienten al eliro de la valo.

Per la ekvido al tiu valo ni surprizigite haltigis niajn ĉevalojn. Tiu surprizo sed ne estis kaŭzate de la valo mem, sed de io alia. La vidalvida altaĵo fakte estis senarbarigita, kaj tieis kampoj, kaj sur la grundo paŝtiĝis ĉevaloj, bovoj, ŝafoj kaj kaproj. Je la bazo de la altaĵo estis kvin grandaj lignodomoj kun flankaj dometoj, simile al niaj germanaj

bienoj, kaj tute supre sur la plej alta pinto estis malgranda kapelo, sur kiu altis grandega kruco kun el ligno skulptita figuro de la Redemptoro.

Flanke de tiu kapelo ni rimarkis plurajn personojn, kiuj sed ŝajne ne vidis nin. Ili vidis okzidenten, kie la sunbulego malleviĝis ĉiam pli supren, kaj kiam ĝi laŭsajne estis atinginta la etan rivereton, kies akvon ĝi briligis en la plej belaj koloroj, eksonis de supre la arĝenteca sono de malgranda sonorilo.

Tie ĉi, meze en la sovaĝa okzidento, en la plej profunda praarbaro, la figuro de la Alkrucigito! Meze inter la militaj vojoj de la indianoj kapelo! Kortuŝite mi deprenis mian ĉapelon.

„*Ti ti* — kio estas tio?“ Winnetou demandis.

„*Settlement*“, Akrokulo respondis. „Ili sonorilas pro preĝi la ‚*Ave Maria*‘:n“

„*Uf!* Winnetou vidas la setlejon kaj li aŭdas la sonon de la sonorilo. Sed kiel ĝi venis tien ĉi en la sovaĝejon?“

„Ni vidu!“ diris Akrokulo, kiu vidis, ke mi estis preĝanta.

Kiam la lasta sono estis finehinta, subite eksonis kvarvoĉa kantado malsupren de la monteto. Mi ekaŭskultis, surprizigite de la kantado mem, sed eĉ pli surprizigite pri la vortoj:

*„Nun ekcedas la lum’ de la tago;  
nun venas la nokto trankvile.  
Ho, se nur l’ anima plago  
povus pasi al l’ tago simile!  
Mian plendon mi al vi tributas,  
ho portu ĝin al l’ trono de Di’,  
permesu, ke mi vin salutas,  
Madon’, mi pie adoras al vi:  
Ave Maria!“*

Kio nu estis tio? Tio ja estis mia propra poemo, mia ‚*Ave Maria*‘! Kiel ĝi venis tien ĉi en la sovaĝejon de la rokmontaro? Mi unue ne sciis, kion mi diru. Sed tiam, kiam la simplaj harmonioj fluadis kiel nevidebla ĉiela riverego de la monto malsupren trans la valo, ĝi ekregis min per nerezistebla fortego. Mia koro ŝajnis grandiĝi al senlimaj dimensioj, kaj la larmoj fluis en grandaj gutoj laŭ miaj vangoj.

Kiel tiu kanto venis tien ĉi, al loko, kie mi apenaŭ estis ekspektinta la ĉeeston de indiano, des malpli povis supozi la ekziston de tiel bone trejnita duobla kvarteto? Kiam mi aŭdis la lastajn sonojn finsoniĝi en la valo, mi ŝiris la pafilon de la ŝultro, lanĉis la du tubojn rapide unu post la alia, kaj donis la spronojn al la nigra virĉevalo. Mi flugis malsupren al la valo, en la rivereton, transe elen kaj tiam al la lignodomo, sen vidi malantaŭen al la kunuloj.

La du pafoj ne nur kaŭzis laŭtan eĥon en la valon, sed ankaŭ ekmoviĝon. La pordoj de la domoj malfermiĝis kaj aperis homoj, kiuj zorge elvidis pro ekkoni, kial oni pafis. Kiam ili ekvidis blankulon kun sufiĉe civilizita aspekto, ili retransviliĝis kaj paŝis

renkonte al mi ekspektolene.

Antaŭ la pordo de la plej proksima lignodomo staris maljunulino. Ŝia vestaĵoj estis simplaj kaj puraj, ŝia tuta aspekto atestis diligentan laboradon, kaj sur ŝia mieno, kiu estis enkadrigita de neĝblankaj haroj, estis tiu beate ridetanta pacemo, kiu povas esti nur la posedaĵo de animo, kiu vivas en neŝanĝebla fido pri ĝia Dio.

„*Good evening, grandmother* — bonan vesperon, avino! Bonvolu, ne ektimiĝu. Ni estas honestaj arbaraj migrantoj. Ĉu estos permesata al ni deĉevaliĝi tie ĉi?“ mi demandis.

Ŝi kapjesis ridetante.

„*Welcome, Sir!* Deĉevaliĝu en la nomo de Dio! Honesta viro ĉiam estas bonvenigataj de ni. Jen vidu mian maljunulon kaj mian Willy:n! Ili helpas al Vi.“

La kantintoj estis atentigitaj per miaj pafoj kaj plej rapide malsupreniĝintaj de la altaĵo. Nun ili estis atingintaj la loĝejojn, antaŭ ĉiuj estis fortika maljunulo, flanke de li forta, juna viro, malantaŭ ili ses viroj kaj knaboj plu, ĉiuj en la solidaj, teneblaj vestaĵoj de la sovaĝejo. Ankaŭ la personoj, kiujn mi estis rimarkinta antaŭ la aliaj konstruaĵoj, estis alpaŝintaj. La maljunulo etendis sian dekstran manon al mi kun senartifika mieno kaj salutis min.

„Bonvenu, *Sir*, en la *Helldorf-settlement!* Estas plezuro foje vidi homojn! — Bonvenu denove!“

Mi saltis de la ĉevalo kaj ni skuis la manon de la alia. „*Thank you, Sir!* Ne estas io pli bela en la vivo ol amikeca homvizaĝo. Ĉu Vi havas tranoktan eblecon por tri lacaj rajdantoj?“

„Jes, certe! Ni ja certe havos spacon por homoj, kiuj bonvenas al ni!“

Ĝis nun ni estis interparolinta angle, sed tiam unu el la pli junaj viroj alpaŝis, rigardis al mi kaj vokis:

„Patro Hillmann, Vi povas paroli germane kun tiu sinjoro. Hura!, kia honoro kaj ĝojo! Divenu, kiu estas tio!“

La maljuna Hillmann mirigite vidis al mi kaj demandis:

„Do germana samlandano? Ĉu vi konas lin?“

„Jes, sed mi unue devis memoradi. Bonvenu, sinjoro! Ĉu ne, estas Vi, kiu skribis kaj muzikigis la *„Ave Maria“*:n, kiun ni ĵus kantis?“

Nun estis mia vico miriĝi.

„Ho jes“, mi konfesis. „De kie Vi konas min?“

„De Chicago. Mi estis membro en la kantoklubo de direktoro Balding, kiu porĥorigis Vian poemon. Ĉu Vi ankoraŭ povas memori la koncerton, en kiu ĝi estis prezentata la unuan fojon? Mi tiutempe kantis la duan tenoron, sed nun mi kantas la unuan bason. Mia voĉo malaltiĝis.“

„Germano — konatulo de Bill — la poeto de nia *„Ave Maria“*!“

Tiel oni vokis ĉirkaŭ mi, kaj kiom viroj, virinoj, knaboj kaj knabinoj ĉeestis, tiom manoj etendiĝis al mi, kaj tiom voĉoj vokis al mi ĉiam ripetatan benvenigon. Estis al mi momento de ĝojo, kian oni ne spertas ofte.

Intertempe ankaŭ Winnetou kaj Akrokulo estis atingintaj nin. Per la ekvido al la apaĉo la bonaj homoj ŝajnis ekemi esti zorgitaj. Sed mi provis tuj neigi iliajn timojn.

„Tiu estas Akrokulo, fama savanulo, kaj jen stara Winnetou, la fama ĉefo de la apaĉoj, antaŭ kiu Vi ne bezonas havi timon.“

„Ĉu Winnetou? Ĉu estas eble?“ demandis la maljuna Hillmann. „Pri li mi aŭdis cent fojojn, kaj ĉiam nur bonaĵojn. Tion mi ne estis ekspektinta. Lia vizito estas honoro al ni, *herr*, ĉar tiu viro estas pli fame kaj respektite ol kelka princo transe en la maljuna lando.“

Li prenis sian ĉapon de la grizhara kapo kaj etendis la manon al la ĉefo:

„*I am your servant, Sir* — mi estas Via servisto, sinjoro.“

Mi konfesas, ke tiu parolmaniero al indiano iomete ridetigis min, sed ĝi estis farata per bona kaj honesta intenco, Winnetou kapjesis amikece kaj premis la manon de la maljunulo.

„*Winnetou is your friend. He likes the pale-faces if they are good* — Winnetou estas Via amiko. Li amas la palvizaĝojn, se ili estas bonaj.“

Nun komencis speco de amikeca, amplena kverelo pri kiu regalu la gastojn. Hillmann finigis ĝin per la juĝa eldiro:

„Ili deĉevaliĝis antaŭ mia domo, kaj tial ili ĉiuj tri estas miaj gastoj. Sed pro vi ĉiuj ne devas forpasi ion, vi ĉiuj estas invitataj ĉe mi ĉi vespere. Kaj nun lasu trankvilecon al la sinjoroj, certege ili estas lacaj!“

Li aliaj konsentiĝis pri tio. Niaj ĉevaloj estis kondukataj en unu de la flankaj dometojn, kaj ni devis paŝi en la lignodomon, kie akceptis nin en la loĝejo juna bela virino, la edzino de Willy, de la juna Hillmann. Estis donata al ni ĉiu elpensebla komfortaĵo, kaj dum la mallonga manĝeto, kiujn ni devis enpreni antaŭ la fakta vespermanĝo, kiu hodiaŭ estis planita kiel vera festmanĝado, ni eksciis la cirkonstancojn de la malgranda setlaĵo.

Ĉiuj *settler*-oj estis antaŭe loĝintaj en Chicago. Ili ĉiuj venis el la bavara Fichtelgebirge, kie estas multaj ŝtontranĉistoj, al Ameriko, estis fidele kunagintaj en Chicago, kaj diligente laboradis pro gajni la monon por bieno. Tion ankaŭ sukcesis ĉiuj kvin familioj. Kiam ili devis decidi, en kiu regiono ili volis establi hejmejon, estis malfacila decidado. Tiam ili aŭdis maljunan okcidentulon rakonti pri la Teton-montoj kaj pri la valoraĵoj, kiuj laŭdire amase troveblis en tiuj neesploritajn regionojn. Li ĵure promesis al ili, ke tie supre estus plenaj kampoj de kalcedonoj, opaloj kaj agatoj, karneoloj kaj aliaj semijuvellaj ŝtonoj. Hillmann profesie estis ŝtontranĉisto, kaj tiu raporto entuziasmigis lin. Lia entuziasmo transiĝis al la aliaj, kaj tial oni decidis migri en tiun regionon. Sed la gardiĝemaj germanoj estis sufiĉe prudentaj ne forludi ĉiom da ilia posedaĵo per unu karto. Ili decidis trovi pro bienado ĝustantan lokon, tie ekloĝi kiel *squatter*-oj, kaj nur tiam, kiam la estonto de la bienoj estis certigitaj, serĉi la ŝtonejojn. La maljuna Hillmann estis serĉe antaŭirinta kun du viroj pli, kaj trovis la belegan valon kun la lago. Tiu loko ĝustis al ilia plano. Oni postvenigis la aliajn, kaj nun, post tri laborplenaj jaroj, la decaj homoj povis permesi al si la unuan ripozon.

„Kaj ĉu Vi jam estis estinta supre en la Teton-montoj?“ mi demandis.

„Mia Willy kaj Bill Meinert, kiu konas Vin de Chicago, foje provis supreniri. Tio estis en la pasinta aŭtuno. Sed ili povis veni nur ĝis la lago John Grays. Tiam la pejzaĝo estiĝis tro sovaĝe kaj montece. Ili ne povis iri plu.“

„Estis ilia propra kulpo“, mi komentis. „Ili planis la agadon malĝuste, ĉar ili ne estas okcidentuloj.“

„Ho, *berr*, mi pensas, ke jes!“

„Ne pensu malbone pri mi, se mi insistas pri mia aserto. Eĉ dum trijara kultivigado oni estiĝas nur *settler*, ne okcidentulo. Vi provis atingi la Teton:ojn de tie ĉi sur rekta vojo, kaj okcidentulo scias, ke tio neblas. Kiel Vi volas sukcesi iri tra netraireblaj prarbaroj, en kiuj estas ursoj kaj lupoj, absimoj kaj valoj, en kiu oni ne povas meti la piedon, *cañon*:ojn, en kiuj povas spione atendi *indsmen* malantaŭ ĉiu roko? De tie ĉi Vi unue estus devinta provi atingi la Salt River:on aŭ la John Days River:on. Ambaŭ fluas ne longadistance de la alia en la Snake River:on, kiun Vi tiam estus devinta sekvi kontraŭfluen. Tiel Vi estus atinginta unue maldekstre la Snake River Range:on kaj la tutan Teton Range:on je distanco de pli ol kvindek anglaj mejloj. Sed duope tia peniga kaj danĝeroplana esplora vojaĝo tute ne estas farebla. Ĉu Vi trovis ŝtonojn?“

„Kelkajn muskagatojn, ne pli.“

„Atendu! Winnetou konas la rokmontaron. Mi demandos lin.“

Ĉar mi sciis, ke indiano nur malofte kaj neŝatege parolas pri oraj kaj aliaj valoraj tertrezoroj, mi faris la demandon en la lingvo de la apaĉoj. Sed mi tamen estis konvinkita, ke li rifuzus ĉian sciigon.

„Ĉu mia frato Ŝarliĥ volas serĉi oron kaj ŝtonojn?“ li diris serioze.

Mi klarigis la interrilatojn al li. Li longe vidis malsupren antaŭ sin, tiam lia malhela okulo rigardis la ĉeestantojn, kaj fine li demandis:

„Ĉu tiuj viroj plenumigos deziron de la ĉefo de la apaĉoj?“

„Certe ŝate.“

„Se ili kantos unu fojon plu, kion Winnetou aŭdis ekstere antaŭ la valo, tiam li diros al ili, kie la ŝtonoj estas.“

Mi estis surprizigita. Ĉu la simpla kanto de la „*Ave Maria*“ faris tian egan, fortan impreson al Winnetou, ke li, la indiano, estis decidiĝinta malkovri la sekretojn de la montoj pro tio?

„Ili kantos ĝin“, mi certigis lin.

„Do ili serĉu en la Grand-Ventre-montoj, tie kuŝas multaj orbuloj. Kaj en la valo de la Beaver Dam-rivero, kiu fluigas sian akvon en unu el la sudaj pintoj de la lagon Yellowstone kuŝas multe da tiuj ŝtonoj, kiujn tiuj viroj serĉas.“

Dum mi tradukis tiun informon al la *settler*:oj kaj klarigis la situon de la du menciitaj punktoj, alvenis la unuaj najbaroj, kaj ni devis interrompi la interparoladon.

Poste kaj poste la loĝoĉambro de la lignodomo estis plenigata per homoj, kaj ni festis vesperon, kian mi neniam antaŭe estis spertinta en la okcidento. La viroj ankoraŭ konis ĉiujn kantojn, kiujn ili estis kantintaj en la hejmlando kaj poste en Chicago. Kiel veraj germanoj ili amis la kantadon, kaj sufiĉe taŭge kunprovadis kiel duobla kvarteto. Eĉ la maljunulo kunkantis. Li kantis elteneblan bason. Kaj tiel okaziĝis, ke la paŭzoj de la interparolado estis plenigitaj per plurvoĉaj kantaĵoj.

La apaĉo silente aŭskultis, sed fine li demandis min:

„Kiam tiuj viroj plenumigos ilian promeson?“

Per tio mi memorigis Hillman:on pri la rekompenco, kiun mi estis promesinta al Winnetou, kaj ili komencis la „*Ave Maria*“:n. Sed apenaŭ ili estis komencintaj, la apaĉo malakcepte etendis la manon.

„Ne! En la domo ne sonas bone. Winnetou volas aŭdi ĝin de la monto.“

„Li pravas“, konsentis Bill Meinert. „Tiu kantaĵo estu kantata en la libero. Kunvenu elen!“

La kantistoj forlasis la lignodomon kaj iris kelkan distancon supren. Ni aliaj restis en la valo.

Winnetou staris flanke de mi, sed baldaŭ estis malaperinta. Tiam eksonis de la altaĵo malsupren per belaj, pure kantantaj voĉoj:

„*Nun ekcedas la lum' de la tago;  
nun venas la nokto trankvile.  
Ho, se nur l' anima plago  
povus pasi al l' tago simile — —*“

Ni aŭskultis per silenta devoteco. La malheleco nevedebbligis la kantantojn kaj la lokon, kie ili staris. Estis, kvazaŭ la kanto sonis malsupren de la ĉielo. La komponisto estis uzinta neniujn al efiko celantajn transigojn, neniujn artaĵajn ripetojn kaj renversojn, neniujn postulemajn variaĵojn de la ĉefmotivo. La sonigo konstruiĝis nur per la plej evidentaj gampropaj plentonoj, kaj la melodio estis simpla kiel tiu de preĝeja kanto. Sed ĵus tiu simpleco de la harmonia vico donis al la sonoj tiun kortuŝigon, al kiuj niaj mensoj ne povis rezisti.

Kiam la kanto estis finsoninta, ni ankoraŭ longe staris silente, kaj ne reeniris en la domon, ĝis la kantintoj estis reapertaj en la valo. Sed Winnetou mankis. Pasiĝis pli ol horo, senke li venis, kaj ĉar ni ja malgraŭ ĉio tie ĉi troviĝis en la sovaĝejo, kaj eblis, ke io malbona okazis al li, mi alŝultrigis la pafilon kaj paŝis eksteren. Sed antaŭe mi petis al la homoj ne sekvi min, escepte de ili estus aŭdinta pafon. Mi antaŭsentis, kio retenis la apaĉon en la soleco.

Sekvante la direkton, en kiun mi estis vidinta lin malaperi, mi proksimiĝis al la lago. Tie ĉi ebena roko iĝis trans la malhela akvo, kaj sur ĝi mi ekvidis la figuron de la serĉito. Li sidis proksime al la rando, senmove kiel ŝtonstatuo. Mi proksimiĝis al li per mal-laŭtaj paŝoj, kaj sidiĝis flanke de li, kie mi restis sensone siletante.

Pasis longa tempo, sen ke li faris ion. Sed finfine li malrapide levis la brakon, montris elen al la akvo kaj diris kvazaŭ per la impreso de profunda, urgiga penso: „*Ti paapu ŝi itsji* — tiu ĉi lago estas kiel mia koro.“

Tiam li resilentadis kaj rekomencis nur post longa paŭzo:

„*Ntš-nja Manitu nšo; ŝi aguan t'enese* — la Granda Spirito estas bona; mi amas ĝin.“

Mi sciis, ke mi estus nur ĝenante la evoluiĝon de liaj pensoj kaj sentoj per respondo. Tial mi nun ankaŭ silentis. Kaj fakte li baldaŭ pluis:

„Mia frato Ŝarlih estas eminenta militisto kaj saĝa viro dum konsilado. Mia animo estas kiel lia, sed mi ne vidos lin, kiam mi iam venos en la Ĉiamajn Ĉasejojn.“

Tiu penso malgajigis lin. Ĝi estis denova pruvo, kiel la apaĉo amis min. Tamen mi nun respondis per bona kaŭzo:

„Mia frato Winnetou posedas mian tutan koron. Lia animo vivas en miaj agoj. Sed mi ne vidos lin, kiam mi iam atingos la ĉielon de la beatuloj.“

„Kie estas la ĉielo de mia frato?“ li scivolis.

„Kie estas la Ĉiamaj Ĉasejoj de mia amiko?“ mi redonis la demandon.

„Manitou posedas la tutan mondon kaj ĉiujn stelojn!“ li asertis.

„Kial la granda Manitou donas tian malgrandan parton de la mondo al siaj ruĝaj filoj, sed al siaj blankaj infanoj ĉion? Kio estas la Ĉasejoj de la indianoj, rilate al la senlima grandiozeco, en kiu loĝos la beatuloj de la blankuloj? Ĉu Manitou malplie amas la ruĝulojn? Ho ne! Miaj ruĝaj fratoj kredas al ega, eminenta mensogo. La kredo de la blankaj viroj diras: ‚La bona Manitou estas la patro de ĉiuj siaj infanoj en la Ĉielo kaj sur la tero.‘ La kredo de la ruĝaj viroj sed diras: ‚Manitou estas nur la Sinjoro de la ruĝuloj. Li postulas mortigi ĉiujn blankulojn.‘ Mia frato Winnetou estas justa kaj saĝa. Li pripensu! Ĉu la Manitou de la ruĝuloj ankaŭ estas la Manitou de la blankuloj? Kial li tiukaze trompas siajn ruĝajn filojn? Kial li lasas ilin malaperi de la mondo kaj permesas al la blankuloj, ke ili kunkreskiĝas milionope kaj regi la mondon? Aŭ ĉu la Manitou de la ruĝuloj estas iu alia kiel tiu de la blankuloj? Tiukaze la Manitou de la blankuloj estas pli forta kaj pli pardonema ol la Manitou de la ruĝuloj. La Manitou de la palvizaĝoj donas al ili la tutan mondon, kune kun mil ĝojoj kaj ravigoj, kaj tiam li lasas ilin regi pri la beateco de ĉiuj ĉielo kaj de eterneco al eterneco. Sed la Manitou de la ruĝuloj donas al siaj anoj nur la sovaĝan savanon kaj la senvivajn montarojn, la bestojn de la arbaro kune kun ĉiamdaŭra mortigado kaj murdado, kaj poste li promesas al ili post la morto la tenebrajn Ĉasejojn, kie la militado kaj la murdado komencos denove. La ruĝaj militistoj kredas al iliaj medicinistoj, kiuj diras, ke la indianoj en la Ĉiamaj Ĉasejoj mortigos ĉiujn animojn de la blankuloj. Se nu mia frato trovos en tiuj sangoriĉaj ĉasejoj sian fraton Ŝarlih:n, ĉu li mortigus lin?“

„Uf!“ jen vokis la apaĉo laŭte kaj fervore. „Winnetou defendos la animon de sia bona frato kontraŭ ĉiuj ruĝaj viroj. *Hough!*“

„Do pripensu, mia frato, ĉu la medicinistoj ne eldiras mensogon!“ mi admonis.

Winnetou pripense silentadis, kaj mi evitis malutili al la efiko de miaj vortoj per pluaj komentoj.

Ni interkonis ekde jaroj. Ni dece estis partigintaj mizeron kaj ĝojon, kaj estis helpintaj unu al la alia en ĉia danĝero per mortriskema sindono. Sed neniam, laŭ lia tiutempa peto, estis elparolita unu vorto pri la kredo. Neniam, eĉ ne per unu silabo mi estis provinta detruigante penetri liajn religiajn opiniojn. Mi sciis, ke li agnoskis ĵus tion tre valore pri mi, kaj tial miaj nunaj prezentoj certe havis la duoblajn efikojn al li.

„Kial ne ĉiuj blankaj viroj estas kiel mia frato Ŝarlih? Se ili estus kiel li, Winnetou kredus al iliaj pastroj!“

„Kial ne ĉiuj ruĝaj viroj estas kiel mia frato Winnetou?“ mi respondis. „Estas bonuloj kaj malbonuloj inter la blankaj kaj inter la ruĝaj viroj. La mondo estas pli ol mil tagrajdadojn longe kaj same vaste. Mia frato konas nur tute malgrandan parton de ĝi.“

Ĉie regas la blankuloj, sed ĵus tie, kie loĝas mia frato, sur la sovaĝa savano, kaŝiĝas la malbonuloj de la palvizaĝoj, kiuj devis fuĝi antaŭ la leĝoj de la bonuloj. Tial Winnetou pensas, ke la plej granda parto de la palvizaĝoj estas maliculoj. Mia frato migras sole tra la montaro, li ĉasas la bizonon kaj batalas kontraŭ siaj malamikoj. Pri kio li povas ĝoji? Ĉu ne la morto spione atendas lin malantaŭ ĉiu arbo kaj arbedo? Ĉu li iam povis donaci sian konfidon kaj sian amon al ruĝulo? Ĉu lia vivo ne estas estinta nur laborado, zorgado, atentado kaj frustrigo? Ĉu li trovas trankvilon, pacon, konsolon kaj refreŝigon por sia lacigita animo nu inter la malbelegaj skalpoj de la *wigwam* aŭ sur la perfidema restejo de la sovaĝejo? La Savanto de la blankaj viroj sed diras: ‚Venu al mi ĉiuj, kiuj estas penigitaj kaj ŝarĝitaj, mi volas refreŝigi vin.‘ Mi sekvis la Savanton, kaj mi trovis la pacon de la koro. Kiam mia frato ne ankaŭ volas iri al li?‘

„Winnetou ne konas tiun Savanton“, li diris.

„Ĉu mi rakontu al mia frato pri li?“

Li mallevis la kapon kaj diris post pli longa paŭzo:

„Mia frato Ŝarlih parolis prave. Winnetou ne amis alian kunulon kiel lin. Winnetou neniam fidis pri neniu homo kiel pri sia amiko, kiu estas palvizaĝo kaj kristano. Mia frato konas la landojn de la mondo, li legis multajn librojn de la blankuloj, li estas riskeme dum la batalo, saĝe ĉe la konsilada fajro kaj milde kontraŭ la malamikoj. Li neniam trompis sian fraton Winnetou, kaj ankaŭ hodiaŭ diros la veron al li. La vorto de mia frato valoras al mi pli ol la paroladoj de ĉiuj blankaj instruistoj. La ruĝaj viroj vokegas kaj krias, sed la blankaj viroj havas muzikon, kiu venas de la ĉielo kaj plusonas en la koro de la apaĉo. Mia frato traduku al mi la vortojn, kiujn la viroj de tiu ĉi vilaĝo kantis!“

Mi komencis per la tradukado kaj la klarigo de la ‚*Ave Maria*‘, kaj rakontis al li pri la kredo de la palvizaĝoj. Dum tio mi provis prezenti ilian konduton kontraŭ la indianoj laŭeble amikece, kaj mi ne faris tion per recitado de instruitaj dogmoj kaj ruzegaj elcerbumaĵoj, sed mi parolis per simplaj, senornamaj vortoj. Mi parolis al li en tiu milda, konvinkiga sono, kiu traĝas al la koro, evitas ĉiun superemon kaj kaptas la atenton de la aŭskultanto, kvankam ĝi pensigas lin, ke li dediĉiĝis al tio per propra volo kaj decido.

Winnetou aŭskultadis silente. Estis amplena retelĵetado pro animo, kiu meritis esti savata el la katenoj de la erarado. Kiam mi estis finiĝinta, li ankoraŭ sidis tie longe, sinkinta en profundan silentadon. Mi aŭdis la postefikojn de miaj vortoj per neniu sono, ĝis li malrapide stariĝis kaj etendis sian manon al mi.

„Mia frato Ŝarlih parolis vortojn, kiu ne povas morti“, li komencis profunde elspirante. „Winnetou ne forgesos la grandan, bonkoran Manitou:n de la blankuloj, la filon de la Kreinto, kiu ekmortis sur la kruco, kaj la virgulinon, kiu loĝas en la ĉielo kaj aŭdas la kantadon de la *settler*:oj. La kredo de la ruĝaj viroj instruas malamon kaj morton. La kredo de la blankaj viroj instruas amon kaj vivon. Winnetou jam pripensis longajn jarojn pri tio. Sed nun li atingis klarecon. Mia frato estu dankata! *Hough!*“

Ni iris reen al la lignodomo, kie oni estis preskaŭ afliktiĝintaj pri ni. Oni estis interparolinta pri la *railtroubler*:oj kaj ogelaloj. Mi diris al la homoj, ke ili fakte estus devintaj fortifikigi ilian *settlement*:on, kiu estis tia soleca kaj neseкура ejo. Ili komprenis tion kaj decidis baldaŭ fari la nefarintaĵon. Klaris, ke ilia loĝejo ĝis tie nur ne estis ektrovita de

la esploraj vidoj de la ruĝuloj nur pro ĝia soleca situo. Se iam malamikeca indiano estus veninta en la proksimon, la sekureco de la valo estus tuj pereinta. La dek kvar viroj de la *settlement* ja estis bone provizitaj per pafiloj kaj sufiĉe da pafbezonaĵoj, kaj ankaŭ la virinoj kaj pli grandaj infanoj posedis sufiĉan kuraĝon kaj sperton lanĉi pafilon, sed kio estis tio kontraŭ arego de sovaĝaj uloj, kiu povis aperi centare! Mi, en la situacio de tiuj viroj ne estus konstruinta la lignodomojn je iliaj nunaj lokoj, sed dense sur la bordo al la lago, tiel ke ili povus nur esti atakataj de la tera flanko.

Li direkto, kiun la *railtroubler*-oj volis sekvi, supozendis, ke ilia vojo ĉiukaze preterpasis tiun ĉi lokon je fora distanco. Tamen mi petis al la *settler*-oj atentiĝi, kaj speciale ankoraŭ plifortikigi iliajn mankohavajn barilojn.

Estis malfrue, kiam ni kuŝiĝis post la foriro de la aliaj gastoj. Ni ripozis en la malmolaj litoj de Hillmann, kiujn li gastamece estis lasintaj al ni, kaj ni deiris je la sekvinta mateno kun elkora danko de la decaj homoj, kiuj ankoraŭ akompanis nin kelkan distancon. Antaŭe ni devis promesi al ili reveni, kiam nia vojo rekondukus nin en ilian proksimon.

Antaŭ ke ili definitive adiaŭis, la ok kantistoj denove kuniĝis, pro kanti la „*Ave Maria*“:n por la apaĉo. Kiam ili estis finiĝintaj, li skuis la manojn de ĉiuj.

„Winnetou neniam forgesos la kanton de siaj blankaj amikoj.“

Niaj ĉevaloj estis bone refreŝiĝintaj de la hieraŭa peniga rajdado. Ili kuris, ke estis nura plezuro. La loĝantoj de la Helldorf-*settlement*, kiu haviĝis sian nomon de la bavara vilaĝo, el kiu tiuj homoj estis venintaj, jam pli ofte estis estintaj en Echo, kaj estis klarigintaj la plej rektan vojon al ni detale, tiel ke ni povis esperi, per la rapideco de niaj ĉevaloj, atingi tiun lokon jam je la vespero.

Winnetou estis dum la tago eĉ pli unusilabeme ol kutime, kaj kelkfoje, kiam li rajdis distancon antaŭ ni, kaj pensis, ke ni ne povis aŭdi lin, estis al mi, kvazaŭ mi estus aŭdinta lin ripeti mallaŭte zumante la melodion de la „*Ave Maria*“, rimarko, kiu devis surprizigi min des pli, ĉar la indianoj ĝenerale preskaŭ ĉiuj ne havas komprenecon pri muzikado.

Je la posttagmezo la siluetoj de la montoj pli krudiĝis, amasiĝis kaj krutiĝis. Ni ekiĝis en ĥaosajon de belegaj, malvastaj kaj komplikaj valetoj, ĝis ni finfine je la vespero de kruta altaĵo ekvidis la celon malantaŭ ni — la Echo-*cañon*:on kun la relvojo kaj la pacema stacio, kiun ni volis savigi antaŭ la pereco.